

KRISTANA KERNO EN LA ZAMENHOFA HOMARANECO

Miroslav Smyčka

aperis en la gazeto [Dio benu](#), presorgano de la Katolika Sekcio de ĈEA kaj la ĉefa IKUE-sekcio, [1992, n-ro 3](#)

Zamenhof, kiel ni scias, estis hebreo - tamen ni trovas en lia politika-religia doktrino nomita "homaranismo" kernon pure kristanan pere de la "amo al proksimulo". - Laŭ Zamenhof la homaranismo estas ja "celado al pura homeco kaj al absoluta intergenta justeco kaj egaleco". Homarano estas do homo rigardanta sin en solidareco kun la tuta homaro. - Se oni parolas pri homaranismo kiel pri politika - religia doktrino, ni devas kunligi jenan politikan parton de ĉi-nocio kun alia "-ismo", kun la nocio "esperantismo", kio ja estas penado disvastigi en la mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa. Sed tiu penado disvastigi en la mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, havas kvazaŭ monero sian politikan dorsflankon. Ĝi estas penado fronti kontraŭ la hegemonio de kiu ajn etna lingvo en diversaj mondpartoj, eventuale eĉ en la tuta mondo. (Iam oni uzas eĉ en okcidento la terminon "rezisto kontraŭ la lingva imperiismo" de grandaj lingvoj.) En la mondo ekzistas ja kelke da miloj de diversspecaj lingvoj, kies uzantoj ne povas ja ekzisti en servuteca rilato al la posedantoj de unu granda "mastra" lingvo en sia mondoparto. -

La religia, aŭ oni eble eĉ povus diri humaneca parto de la doktrino "homaranismo" fontas ja tipe el la kristana "amo al proksimulo." - Zamenhof jam kiel knabo suferis pro la ĉiamaj kvereloj kaj interbataloj inter la diversaj gentoj en sia naskiĝurbo Bialistoko. (La interbataloj estis eĉ multe pli oftaj ol la kvereloj, ĉar ili ne bone komprenis unuj la aliajn - pro tio ili eĉ ne povis kvereli, nur ataki sin reciproke. Kaj precipe hebreoj en Rusio devis ofte tremi antaŭ pogromoj kontraŭ si.) - Ni nun ĉe ni konas la batalojn de "skinoj" kontraŭ ciganoj (kiuj cetere sin mem nomas "romuoj") kaj ni nun ofte aŭdas kaj legas pri la etna interbatalo en Bosnio-Hercegovino kaj en Intermontara Karabaĥio - sed al knabo kaj poste junulo Zamenhof sufiĉis tio, kion li travivis kaj spertis en sia Bialistoko al la ekesto de la ideo trovi rimedon por la interpacigo kaj interfratigo de la najbaraj gentoj. - Jes, el la senkulpa, pura knaba amo al la homa familio, suferanta per konstantaj konfliktoj kaj interbataloj, fontis la intenco krei al ĝi facilan kaj neŭtralan interkomprenilon. - Jes, tio estis jena vera, pura amo al la proksimulo, kiun predikis al ni Jesuo, kaj kiun en Bialistoko enmetis Sankta Spirito en la koron kaj cerbon de Ludoviko Lazaro. - Kaj la amo al proksimulo estas - almenaŭ por mi - la ĉefa principo de la Jesua instruado; kaj la vortoj de Kristo estu por ni la ĉefesenco de la Nova Testamento (samkiel ili estis por jena biblia Maria, kontraste al ŝia fratino Marta), kaj la ĉefpostulo de Jesuo estas "ami sian proksimulon kiel sin mem". Jesuo superigas la mizerikordon antaŭ la oferoj. Li diras ekz.: "kiam vi faras festenon, ne invitu viajn parencojn, amikojn kaj najbarojn, ĉar tiuj rekompence invitus ankaŭ vin - sed invitu malriĉulojn, kriplulojn, lamulojn, blindulojn - kaj vi estos feliĉaj, ĉar ili ne povas rekompenci vin, sed vi rekompenciĝos ĉe la releviĝo de la justuloj".

Ĉu povas iuj aliaj vortoj esprimi pli trafte kaj elokvente nian devon konstante helpi al la suferanta homaro? - Sed bedaŭrinda estas tiu cirkonstanco, ke Kristo ne precizigas tro la nocion "proksimulo", ke tiu estas ne nur la suferanta aŭ malsatanta homo, kiun oni dum nia vivvojo renkontas (cetere en la tempoj de Kristo estis tiel, ĉar ne ekzistis gazetoj, radio, televido - oni do ne povis ekscii, ke suferas kaj insiste petegas nian helpon iuj malproksimaj "proksimuloj" sur la alia fino de la mondo). - Vere la nocio "proksimulo"

ĝin kulpas. Ne nur en Esperanto, sed eĉ en aliaj lingvoj - "der Nächste", "le prochain", "il prossimo" - preskaŭ en ĉiuj lingvoj tiu nocio imputas signifon de iu proksima - kaj tial nin tuŝas ĉefe nur la mizero en nia proksimeco, maksimume en nia mondparto - sed se ni de tempo al tempo ekscias pri statistika noto, ke ekz. mortas pro malsato en la mondo ĉiujare ĉ. 50 milionoj da homoj - inter ili plej granda parto da beboj kaj infanoj - aŭ ke samtempe mortas en Afriko kelkaj dekoj da miloj potage per malsato pro la pereiga sekeco, tio nin ŝajne ne tro tuŝas! - Indus ĉiutage en la televido montri la mortantajn bebojn ĉe la elsekiĝintaj mamoj de iliaj patrinoj - eble tio poste movus la konsciencon de la riĉa, norda mondoparto, por ke ni feliĉuloj, tie ĉi naskiĝintaj, povu poste konsideri eĉ tiujn malproksimulojn kiel niajn verajn "proksimulojn". - Fine unu proponon: Germanoj havas krom la nocio "der Nächste" ankaŭ sinonimon "Mitmensch". - Do ni uzu eĉ en Esperanto anstataŭ "proksimulo" - simile al "Mitmensch" la nocion "Kunhumo". Kaj la radikoj "hom-" ni superigu antaŭ la nocioj "ĉeĥo", "slovako", "kristano", "katoliko" ktp! - Kaj tute laste mi finas per la vortoj de slovaka nacia verkinto, poeto ankaŭ ĉeĥe verkinta Ján Kollár el lia poemego "La Filino de Slavio":

"A vždy, zvoláš-li Slovan, nechť se ti ozve člověk!" Esperantlingve: "Kaj ĉiam vokante "la slav'", vi aŭdu resoni "la hom'!"